

# JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2020–2021

---

## 1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. Esperanto-Aktiv'
- 1.4. Foiroj

## 2. Kapabligo

- 2.1. Kulturcentroj
- 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
- 2.3. Interretaj kursoj
- 2.4. KER-Ekzamenoj
- 2.5. Komisiono Espéranto à l'école
- 2.6. Afrika solidareco
- 2.7. Ĝemelaj urboj

## 3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Preleg-turneoj

## 4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Komitato kaj membraro
- 4.3. Financo

## 5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

## 6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

# Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Esperanto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta la 28an de majo matene, aŭ skribi al [estraro@esperanto-france.org](mailto:estraro@esperanto-france.org).

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto: Said Baluĉi, Susanna Beglaryan, Emmanuel Desbrières, Guy Camy, Raymonde Coquisart, François Lo Jacomo, Didier Janot, Clair Mahé, Raportas Laure Patas d'Illiers, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Bert Schumann, Jean-Luc Thibias, Pascal Vilain

Agrablan legadon deziras al vi,

La estraro de Esperanto-France.

## 1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. Esperanto-Aktiv'
- 1.4. Foiroj

### 1.1. Gazetara Komunikado

Multaj artikoloj aperis en la franca gazetaro:

<https://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2021>

### 1.2. Le Monde de l'Espéranto

Ĉefredaktoro : Claude Nourmont. Grafika laboro : Emmanuelle Richard

- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Bernard Behra, Raymonde Coquisart, Mireille Grosjean, Hori Jasuo, Anne Jausions, Didier Loison, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Yves Nicolas, Gilles Tabard, Renée Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La franclingvajn tekstojn kontrollegas Yannick Dumoulin, Janine Dumoulin kaj Pascal Villain. La esperantlingvajn tekstojn kontrollegas Brian Moon kaj Pascal Villain.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, Le Monde de l'Espéranto estas nun enretigata en la retejon de Esperanto-France: <https://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>

- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.
- Aperis du numeroj en la lasta periodo; entute oni raportis pri okazaĵoj en dudeko da landoj de ĉiuj kontinentoj.
  - Numero 606/607 “Bunta Esperantujo”
  - Numero 608 “Lerni Esperanton”

*Raportas Emmanuelle Richard*

### 1.3. Esperanto-Aktiv’

La reta informletero Esperanto-Aktiv’, verkita en la franca lingvo, aperas ĉiumonate. UFE kaj JEFO kune dissendas ĝin, de 2010, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 3000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe. En 2021 ĉirkaŭ 35 personoj ricevis ĝin perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn en <https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al [teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org](mailto:teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org)

#### Kvar rubrikoj

- **Découvertes** (“Malkovroj”) prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l’ont fait... dans leur région** (“Okazis”) listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Raymonde Cocquisart kaj Dominique Lacambre.  
→ Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian sperto.
- **Calendrier** (“Okazos”) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.
- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** (“Leginda, spektinda, aŭskultinda”) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

#### Redaktora teamo

Raymonde Coquisart (redaktado de rubriko “Ils l’ont fait...”, preparado kaj dissendado de la papera versio), Dominique Lacambre (kalendaro), Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau (kunordigado, redaktado), Jean-Pierre Rouvet (enpaĝigado de la PDF-dokumentoj).

Listo de artikoloj

Monato	N°	Malkovroj	Leginda, spektinda, aŭskultinda
01 / 2021	EA 119	Le Monde de l'espéranto, la revue de l'association Espéranto-France	<i>PMEG</i> , de Bertilo Wennergren
02 / 2021	EA 120	En direct de Mars... et en espéranto.	<i>Sen familio</i> , d'Hector Malot
03 / 2021	EA 121	Le président d'Espéranto-France nous présente la fête du printemps	<i>Stranga malapero</i> , de Laure Patas d'Illiers
04 / 2021	EA 122	Une boutique en ligne pour Espéranto-France	<i>700 limerikoj</i> , d'Hannes Larsson
05 / 2021	EA 123	La Maison Culturelle de l'Espéranto, à Grésillon	<i>Veganismo</i> , de Valérie Giroux et Renan Larue
06 / 2021	EA 124	Vikipedio, une encyclopédie pas comme les autres	<i>Ĉiuj super-herooj</i> , de Lilian Thuram
07 / 2021	EA 125	Espéranto et naturisme	<i>Esperanto Subgrunde 2</i> , le nouvel album en préparation par Vinilkosmo
08 / 2021	EA 126	Un nouveau manuel d'espéranto chez Assimil	<i>Cahier d'exercices Espéranto</i> , de Sébastien Erhard
09 / 2021	EA 127	Écrire de la science-fiction en espéranto	<i>Sur bluaj planedoj</i> , de Laure Patas d'Illiers
10 / 2021	EA 128	Le Monde Diplo en espéranto	<i>La Morto en Venecio</i> , de Thomas Mann
11 / 2021	EA 129	Club de lecture en espéranto	<i>Ili kaptis Elzan!</i> , de Claude Piron
12 / 2021	EA 130	Quiz	<i>Franca Antologio</i>

*Raportas Emmanuelle Richard*

1.4. Foiroj

**Foiro pri matematikaj ludoj**

Kiel pasintjare, tri parizaj membroj partoprenis, de la 27a ĝis la 30a de majo, la foiron pri matematikaj ludoj organizitan virtuale de la asocio Animath. Ni kreis novan filmeton [ElémentERe, l'espéranto!](#) aldone al la du pasintjaraj kaj al matematika filmo de François Lo Jacomo pri orientita geometrio. Ĉiuj kvar daŭre videblas per Jutubo (spektitaj entute pli ol 400-foje). Ĉiutage de la 15a ĝis la 17a, ni ĉeestis virtuale sed mankis publiko ĉar la anonco pri nia budo estis ne trovebla. En 2022, la foiro okazos ĉeeste kaj virtuale.

**Homara festo**

Per homaj laborfortoj ni kontribuis al la partoprenado de Espéranto-France en septembro 2021. Dum tri tagoj, 10-11-12a de septembro 2021, pluraj membroj de nia asocio venis al la Homara festo por deĵori ĉe la budo de

Espéranto-France ene de la “Libra Vilaço”. Aldone al la disdonado de kalendaretoj kaj paĝmarkiloj, pluraj libroj estis venditaj tiuokaze. Tiu sperto naskis plurajn ideojn por plibonigi la venontajn ĉeestajn eventojn.

*Raportas François Lo Jacomo*

## 2. Kapabligo

### 2.1. Kulturcentroj

2.1.1. Greziljono - Kulturdomo de Esperanto (MCE Grésillon)

2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

2.3. Interretaj kursoj

2.4. KER-Ekzamenoj

2.5. Esperanto en lernejoj

2.6. Afrika solidareco

2.7. Ĝemelaj urboj

## 2.1. Kulturcentroj

### 2.1.1. Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France plu estas komitatano de Greziljono ekde 2020. Reprezentanto de Espéranto-France: Didier Loison

#### Propraj staĝoj

- Entute: 45 tagoj, 1205 tranoktoj, 2725 preparitaj manĝoj, por 209 homoj el kiuj 16 infanoj.
- Printempa kursaro nuligita pro kronviruso, ĉiuj aliaj staĝoj okazis.
- Someraj staĝoj dum 34 tagoj en julio kaj aŭgusto kun entute 137 personoj.
- Multaktivecaj staĝoj kun ĥoro Interkant, biciklado kaj NaturArto en aprilo kaj oktobro kun 38 personoj.
- Staĝo Aŭtune en oktobro kun 20 personoj.
- Laboroj kun 11 volontuloj okazis dum 98 tagoj por ripari kaj ĝardenumi. Volontuloj bonvenas!
- Instalado de fajrodetektiloj en ĉiuj dormĉambroj.
- Renovigo de la tegmento de la kampadista dometo kaj kuireja alo de la kastelo

#### Aliaj okazaĵoj

- Luado al ne-esperantistaj grupoj por financi laborojn: 25 luoj dum 49 noktoj. Esperantistoj ĝuas rabaton!
- Partnera asocio “FestiNatur” okazigis en julia semajnfino publikan festivalon.
- Partnera asocio “Verdaj Skoltoj” okazigis en aŭgusta semajno junulan muzikan renkonton *FESTeto*.
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝon.

*Raportas Bert Schumann*

### 2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio. Ĝi pretas helpi ne nur en okazigo de ekzamenoj, sed ankaŭ en lingva kontrolo de Esperanto-tekstoj kaj lernolibroj verkitaj de franclingvanoj, aŭ tradukitaj el la franca. Tia kontrolo freŝdate okazis por dulingva porinfana libreto preparata de iu FEI-ano.

## 2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la programo *Kurso de Esperanto*, la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

40 volontuloj korektas (46 en 2019-2020) korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2020 ĝis septembro 2021, 703 lernantoj aliĝis (1541 en 2019-2020) kaj 69 finlernis la elektitan kurson (137 en 2019-2020).

En 2021 Espéranto-France subvenciis la realigadon de KER ekzameno (nivelo A1/A2). Tiujn ekzamenojn realigis Noémie, kiu estas dungita kiel "Service Civique" por la asocio Espéranto Développement-45, kun la helpo de Marcelle Provost. Ekde marto 2022, lernantoj povas trapasi ilin je la fino de la Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons (A1) kaj Gerda Malaperis (A2).

Tria nivelo kurso realiĝis por lernantoj kiuj finstudis la kurson Gerda Malaperis (kaj aliaj lernantoj kiuj deziras plustudi la lingvon). Ĝi enhavas tridek tekstojn el diversaj aŭtoroj kaj stiloj. Tiu kurso postulas multe da klopodoj al la studentoj, sed provizas ilin per multe da vortprovizo kaj tipaj Esperantaj frazturnoj. Tiu kurso efike klerigas la lernantojn kaj trejnigas ilin al verkado.

*Raportas Axel Rousseau*

## 2.4. KER-ekzamenoj

La pandemio devigis nin paŭzi en organizado de KER-ekzamenoj, tamen la KER-teamo gvidata de Katalin Kovats plu laboris pri nova ebleco ekzameniĝi tute rete kaj pri kreado de KER-ekzameno C2-nivela aldone al la B1, B2 kaj C1, kiuj funkcias jam de 2008. Ĉiuj kvar ekzamenoj (re)funkcios ekde somero 2022.

*Raportas François Lo Jacomo*

## 2.5. Komisiono Esperanto à l'école

Agadraporto de la Komisiono Esperanto à l'école: lernojaro 2020-2021

*"Unu jaro plia ni daŭrige uzos ĉiajn eblojn niajn por enkonduki Esperanton en lernejojn."*

Tiel ni konkludis nian 2019-2020 agadraporton kaj tion ni faris dum la lernojaro 2020-2021. Bedaŭrinde, la pandemio decidigis nin provizore interrompi kelkajn agojn, interalie niajn petojn al la edukministerio por ne esti tro "ĝenantaj" en tiuj neantaŭviditaj malfacilegaj situacioj.

Tamen, ni ne restis brakojn kruĉitajn. Resume ni:

- rete kunvenis trifoje.
- Denove, aperigis tutmondan alvokon, por ke ĉiu Esperanto-instruisto en lernejo registru sian kurson en la kursejo de Edukado.net. Nur 13 lernejoj enskribiĝis.
- Denove kaj plurfoje provis kontakti Maja Tišljari, aŭ anoj de ŝia teamo, por akceligi la korektadon de la metodo MLA: ni nur ricevis tri nekontentigajn respondojn. Finfine, UFE decidis mem okupiĝi pri la korektado kaj plibonigo de la franca versio.
- Denove kaj sensukcese relanĉis la federaciojn PEEP-n kaj FCPE-n por kunlaborado.
- Sendis malkontenteco-mesaĝon al France-Info sekve al komentoj de Jean Quatremer dum la elsendaĵo "C'est la faute à l'Europe": senresponda reago!
- Denove kaj sensukcese petis al UFE agi, por ke Unesco rekonu Esperanton kiel francan nematerian heredaĵon.
- Denove kaj sensukcese provis renkonti la respondeculo(j)n de la asocio "Les Chemins de Saint-Jacques de Compostelle" por promocio Esperanton.
- Kontaktis la Italian Esperanto-asociacion, por ke ili provu enkonduki Esperantan kanton dum la malfermo de la 2022 Eŭrovisio-konkurso okazontan en Torino. Ni atendas la baldaŭan decidon.

Konklude :

- 2017-2018 estis esperiga ; 2018-2019 estis mezbona; 2019-2020 estis nebona kiel... 2020-2021, bedaŭrinde.
- Ĉu 2021-2022 (Jarcenta jaro de la intereso de la Ligo de Nacioj pri Esperanto) estos pli sukcesa ? Sekvota...

*Raportas Guy Camy*

## 2.6. Afrika Solidareco

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de Afrika Solidareco.

## 2.7. Ĝemelaj urboj

Daŭra problemo restas funkciigo de vera komisiono pri ĝemelaj urboj. Tamen sukcesoj videblas.

Regule kunvenas geesperantistoj el ĝemelaj urboj i.a. Parizo/Romo, kiu perfekte funkcias. Notinde, ke estas multaj partoprenantoj el diversaj landoj ĉar la du urboj jam vojaĝis rete al Seulo, Tokio. Temoj tre diversaj: ludoj, prelegoj, legokluboj, libera diskuto, kantoj.

Estis la 20-a evento Parizo Romo... Notinde kaj gratulinde!

Diversaj aliaj urboj kunvenas sendube en Francio, ekzemple Troyes, Marseille, ktp.

Mi ne forgesu la paĝon Fejsbuko, kie mi daŭre aperigas informojn. Pasintjare kiam Mireille Grosjean (Svislando) transdonis tiun taskon al mi, estis 163 ŝatantoj, nun 220.

Paĝo : <https://www.facebook.com/Ĝemelaj-Urboj-1691322684436611>

Planoj estas denove aperi informojn sur la UEA Forumo, UEA facila kaj prepari artikolojn por la retejo Esperanto France sen forgesi la reaperigon de la UEA Bulteno pri Ĝemelaj Urboj redaktita pasinte de la eks-delegito Wu Gojang el Ĉinio. Li pretas helpi min post konversacio okaze de iu pasinta reta kunveno kiun ni ambaŭ partoprenis.

*Raportas Raymonde Coquisart*

## 3. Komunumo

3.1. Butiko

3.2. Sidejo

3.3. Landa kongreso

3.4. Preleg-turneoj

### 3.1. Butiko

Komence de 2021, Esperanto-France lanĉis novan retbutikon: <https://butiko-esperanto-france.org/>

Tiu butiko estas facile alirebla por la ĝenerala publiko. Ĝi funkcias nun en la franca, sed estas planite proponi la retejon ankaŭ en Esperanto.

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2021.

Eta Princo	154	1489,60 €
Metodo 11 (ed. 2020)	151	1227,75 €
La Templo de l' Suno	65	770,25 €
Stranga malapero	85	581,85 €
PMEG 2020 (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko)	15	568,00 €
Grand dictionnaire français-espéranto (avec supplément)	51	559,00 €
PIV 2020 Plena Ilustrita Vortaro	9	534,00 €
Grand dictionnaire Espéranto-français	53	529,00 €



Metodo 11 version.2018	56	456,00 €
L'espéranto c'est dans la poche	458	436,00 €
La maljunulino kiu paŝis en la maro	30	358,80 €
Ĉiuj Superherooj	29	316,20 €
Dictionnaire pratique	11	172,00 €
Cours rationnel d'espéranto (éd. 2006)	17	169,00 €
Stylo à bille - globkrajono Espéranto-France	113	164,50 €

## 3.2. Sidejo

La sidejo de Esperanto France elkore dankas vin pro via atento kaj subteno dum la tuta malfacila jaro 2021!

Malgraŭ la malfacilaĵoj rilate al KOVIM-19, ni ricevis kaj traktis multajn telefonalkvokojn, retmesaĝojn, same kiel poŝtleterojn adresitaj al la Sidejo:

- preparis kaj sendis pli ol 520 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj
- registris pli ol 600 aliĝojn al Esperanto-France kaj 440 abonojn al LME
- registris pli ol 203 aliĝojn kaj donacojn al UEA
- same kiel pli ol 120 abonojn al internaciaj revuoj.

Ni prizorgis ankaŭ pri la daŭrigo de la laboro por ordigi kaj ciferecigi nian arkivan trezoron:

<https://arkivo.esperanto-france.org>

Aktuale la Sidejo estas malfermita al la publiko lunde, marde, merkrede (tel: 01 42 78 68 86).

Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭviditajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj al Parizo kaj tra Parizo, nia skipo (Maria Fessler, Jean-Louis Pouillet, Régis Fournier, Said Baluĉi) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

Noto: Susanna Beglaryan emeritiĝis en Januaro 2022. La respondeculo de la sidejo estas nun Said Baluĉi.

*Raportis : Susanna Beglaryan kaj Said Baluĉi*

## 3.3. La landa kongreso

Pro la sansituacio, la kongreso ne okazis en 2021.

## 3.4. Preleg-turneoj

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilatoj kun UEA

4.2. Komitato kaj membraro

4.3. Financoj

### 4.1. Rilatoj kun UEA

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

### 4.2. Komitato kaj membraro

#### Jaro 2020–2021

La komitato por la 2020-2021, estis elektita en Parizo en septembro 2020. La Komitato kunvenis kvar fojojn: en septembro 2020, en januaro 2021, en majo 2021.

#### **Reprezentas la membrojn (2020-2021):**

Alex André • Véronique Bichon • Bernard Cornevin • Bruno Flochon • Xavier Godivier • Vincent Jacques • Jesper Jacobsen • Maurice Juy • Aleks Kadar • Michael Liebman • Jean-Lucien Mazeau • Claude Nourmont • Emmanuelle Richard • Armand Salek • Éric Streichemberger • Gilles Tabard

#### **Estraro (2020-2021):**

- Prezidanto: Bruno Flochon
- Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard
- Vicsekretario: Éric Streichemberger
- Kasisto: Jean-Lucien Mazeau
- Vickasisto: Armand Salek
- Estrarano: Alex André
- Estrarano: Xavier Godivier

#### **Reprezentantoj de la membraj asocioj (2020-2021):**

- Aŭvernio: Jean-Pierre Boulet
- Bretonio: Josette Ducloyer
- Francilio: Marc Giraud
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cezard
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stambach
- Parizo-Francilio: Marc Giraud
- Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey
- Provenco: Pascal Vilain
- JEFO (junuloj): Lucas Teyssier
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Michèle Abada-Simon
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

## Jaro 2021–2022

Por la jaro 2021, nova komitato estis elektita en majo 2021. La komitato kunvenis kvar fojojn: en majo 2021, en oktobro 2021, en januaro 2022, kaj kunvenos en majo 2022.

### **Reprezentas la membrojn (2020-2021):**

Michèle Abada-Simon • Alex André • Véronique Bichon • Bernard Cornevin • Bruno Flochon • Xavier Godivier • Vincent Jacques • Maurice Juy • Aleks Kadar • Jean-Lucien Mazeau • Paul Quevy-Lefevre • Christine Raiffaud • Emmanuelle Richard • Axel Rousseau • Gilles Tabard

### **Estraro (2021-2022):**

- Prezidanto: Bruno Flochon
- Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard
- Vicsekretario: Axel Rousseau
- Kasisto: Jean-Lucien Mazeau
- Vickasisto: Paul Quevy-Lefevre
- Estrarano: Xavier Godivier
- Estrarano: Christine Raiffaud

### **Reprezentantoj de la membraj asocioj (2021-2022):**

- Aŭvernio: Rémi Deneu
- Bretonio: Laurent Peuch
- Francilio: Marc Giraud
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cezard
- Limousin: Clair Mahé
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stammbach
- Parizo-Francilio: Marc Giraud
- Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey
- Provenco: Thierry Spanjaard
- JEFO (junuloj): Clément Baleyte
- FKEA (katolikoj): Bertrand Sajus
- GEE (instruistoj/antoj): Élisabeth Le Dru

## Statistikoj

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 628 membroj je la fino de la periodo 2019-2020 (30a de septembro 2020), kontraŭ 672 membroj je fino de 2018-2019 kaj 605 membroj je fino de 2017-2018). Vidu la suban tabelon / grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2014-2015.

Federacio	2020-2021	2019-2020	2018-2019	2017-2018	2016-2017	2015-2016
(sen federacio)	40	43	34	38	59	61
Aquitaine	55	59	19	66	52	54
Auvergne	13	12	60	12	11	11
Bourgogne-Franche-Comté	16	20	10	23	31	33
Bretagne	29	29	29	35	35	26
Centre-Ouest	57	53	26	50	44	47
France-Est	40	43	58	38	37	41

Paris-Île-de-France	107	108	47	129	118	140
Languedoc-Roussillon	22	29	12	26	25	24
Midi-Pyrénées	16	13	72	11	12	9
Nord	55	64	137	45	32	27
Normandie		15	28	22	21	22
Poitou-Charente	9	8	6	7	6	7
Provence	45	44	40	37	38	44
Rhône-Alpes	85	88	95	65	66	71

## 4.3. Financoj

Vd. la finanĉan raporton.

# 5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

## 5.1. Akvitanio

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

## 5.2. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 5.3. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

La agadoj de la Federacio kaj de la lokaj grupoj estis daŭre malhelpata de la sanitara situacio kiu malpermesis organizi turneon de invititaj eksterlandanoj kaj malfaciligis kursojn. Tamen Esperanto plu viglas en Bretonio kaj ni iom post tiom reaktiviĝas!

### Lokaj grupoj aŭ kontaktoj en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Landerneau, Querrien.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

**Membraro:** ĉirkaŭ 150, ne eblis taksu ĝin precize ĉi jare, pro malmultaj kursoj pluraj asocioj ne enkasigis kotizojn.

### Agoj de la federacio:

**Eldono de la federacia bulteno** *Verda Triskelo* (20-paĝa, kutime 2 foje jare, nur 1 foje ĉi jare okaze de la membrokunveno en aŭgusto 2021), kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet. Legebla en la ttt-ejo de la federacio.

**Retejo:** <http://bretonio.esperanto-france.org/> administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

**Reta diskutlisto** de la membroj gastigata de Esperanto-France: [bretonio@esperanto-france.org](mailto:bretonio@esperanto-france.org) kun 203 abonantoj.

**Retaj kunvenoj de la komitato** por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

**Jara kunveno en Pluezec la 18an de marto 2021 dum Someraj tagoj de Pluezec** kun 16 ĉeestantoj + 1 interrete, programo de la someraj tagoj posttagmeze kun koncerto de JoMo.

**Someraj Tagoj de Pluezec (Estivales de Pluezec) 16-18 aŭgusto** por anstataŭi la kutimajn renkontojn de Pluezec, senpaga alirebla programo : retinterŝanĝoj kun esperantistoj de la tuta mondo kun Fransoazo, ekskursoj kun Jeanne kaj Maryvonne, tabloludoj kun Noël, muzikaj intermezoj kaj trinkejo, libroservo kaj du koncertoj de JoMo. Ni ne estis tre nombraj sed estis agrabla okazo denove kunvenigi la bretonajn Esperantistojn kaj pliajn vizitintojn.

### Aliaj agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Pro la sanitara situacio, pluraj malfacile okazis, pluraj okazis per Interreto. Partopreno kiel staĝanoj aŭ organizantoj de pluraj Bretonoj al eventoj en la kulturdomo de Greziljono: bicikla semajno en junio, interkant-staĝoj, somera programo.

### Rilato kun Esperanto-France

Post aliĝo de Armor Esperanto al la komuna kotizsistemo en 2020, aliĝis Esperanto Rennes en 2021.

## 5.4. Burgonjo-Franĉkonteo

Un atelier espéranto fonctionne au lycée Victor Considérant de Salins-les-Bains : 6 élèves de terminale.

Visio avec les élèves slovènes de Peter GREBC, russes de Elena NADIKOVA, congolais de Joël MUHIRE...etc. prévue en mai 2022.

Dole-Espéranto ne plu ekzistas.

*Raportas Emmanuel Desbrières*

## 5.5. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Ne ekzistas vigla federacia asocio.

Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon (vd. paragrafo 2.1.1).

## 5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 5.7. Fédération Espéranto-Limousin

Same kiel lastjare, oni bedaŭrinde malmulte faris dum 2021. La problemoj estis pli-malpli la sama kiel dum la antaŭa jaro. Pluraj kulturaj eventoj aliffoje ne okazis.

### En Korezo

- Kunvenoj kun kursoj kaj babilado en Brive, sufiĉe regule laŭ la saneblecoj.
- Budo en la Forumo de la Asocioj de Brive en oktobro.
- Ĝenerala Kunveno de Espéranto Limousin en junio ĉe la Prezidanto Gilles Tabard en Junio.

### En Altvieno

- Kunveno ĉirkaŭ la Esperanto-sumoo ĉe Isabelle Jacob en februaro.
- Agrabla kunveno kun promenado ĉe Isabelle en marto.
- Budo en la Forumo de la Asocioj de Limoges en septembro.
- Reekis la dusemajna kurso de Isabelle en Saint-Junien.

*Raportas Clair Mahé*

## 5.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 5.9. Fédération Espéranto-Normandie (Normandio)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 5.10. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

Pro la kronviroza pandemio la agado de Espéranto France-Est estis draste reduktita por la dua sinsekva jaro. Tamen, pro redukto de la kontaktoj, la prezidanto organizis Ĝeneralan Membro-Kunvenon en Stosswihr, sed nur en septembro.

Denove ne povis okazi la antaŭvidita regiona staĝo en Art-sur-Meurthe. La grupo de Nancy restis en kontakto kun la staĝejo.

En 2021 la membraro bedaŭrinde malkreskis. Tamen : abonas nun nian koloran bultenon *LA INFORMILO* niaj samideanoj de Bazelo.

André GROSSMANN daŭre kasistis kaj pluzorgis pri la ret-paĝaro de EFE, <http://esperanto.france.est.free.fr>:

Li ankaŭ fidele pluzorgis la enpaĝigon kaj eldonadon de la ĉiutrimestra bulteno *LA INFORMILO*.

Jean-Luc THIBIAS daŭre okupiĝis sukcese pri la riĉ-enhava libroservo, alirebla en la sama retpaĝaro de EFE. Nur 2 lokaj aranĝoj invitis la libroservon: ĝenerala membrokunveno kaj renkontiĝo en Luksemburgo, kio iom kreskigis la vendojn: la librojn, la aĉetantoj ŝatas malkovri sur vendotablo kaj trafoliumi. Suma jara vendo: 700€.

Okaze de tiu membrokunveno okazis eta ŝanĝo en la estraro: Jean-Luc THIBIAS transprenis la postenon de sekretario de EFE.

Jen la estraro de EFE tiam elektita:

Prezidanto: Edmond LUDWIG

Sekretario: Jean-Luc THIBIAS

Kasisto: André GROSSMANN

Libroservo: Jean-Luc THIBIAS

Retejoj: André GROSSMANN

### Bar-le-Duc

#### **Groupe des Espérantistes Meusiens**

Pro malbonaj eventoj, la raporto ne povis esti farita.

## Mulhouse

### **Mulhouse-Espéranto**

Dua “lama” jaro kaŭze de la virus-pandemio!

- La tradicia “Trireĝa festo” planita la 12an de januaro estas nuligita.
- La Ĝenerala MembroKunveno okazis la 28-an de junio en Saint-Louis (antaŭ la renkontiĝo *Verda Fadeno*).
- La *Verda Fadeno* okazis kvinfoje: la 31-an de majo, la 28-an de junio, la 27-an de septembro, la 25-an de oktobro, la 29-an de novembro aŭ en Rixheim aŭ en Saint-Louis.
- La tradicia informbudo en Ungersheim okazis la 20/21-ajn de novembro.
- *Sud-Rejna-Kuriero* aperis dufoje (no-j 77 kaj 78).  
Redaktita la 16-an de januaro de Robert Kueny, sekretario

## Nancy

### **Esperanto Nancy 54**

- En 2021, kursoj daŭris, ĉiun merkredon, kiam la junuldomo Desforges ne estis fermita. Alvenis nova lernanto kaj entute ĝis 7 gesamideanoj progresis per *Stranga Malapero* aŭ okupiĝis pri ordigo de la biblioteko.
- Gisèle Bertapelle daŭre riĉigis la retejon esperanto-nancy.fr
- Jean-Luc helpis junajn gesamideanojn en traduko esperantlingven de videoludo *Samhain*  
<https://www.kongregate.com/games/JeuxBebel/samhain>
- Liliane Bersweiller organizis la 29-an de aŭgusto promenadan tagon en Graufthal, kie oni povas vidi la rokdomojn de la “Blua Kato”.
- La loka radio R.C.N. – Radio Caraïbes Nancy 90,7 FM rcn-radio.org – malfermis kvarfoje siajn ondojn al nia grupo por unuhora prezento de Esperanto kaj 3 dekminutaj kursetoj.
- La 26-an de junio, grupanoj kunprizorgis budon kun samideana fervojisto Christian Dardenne okaze de fervojista festo en Blainville-Damelevières.
- Ekstere, grupanoj partoprenis la Zamenhof-Feston en Esch sur Alzette en Luksemburgio.
- Same kiel en 2020 kaj en 2022, la grupo ne povis organizi la regionan staĝon en Art-Sur-Meurthe, pro la pandemio.
- Kaj la pomarbo “Esperanto” de Liliane donis siajn unuajn fruktojn, kiuj estis gustumitaj dum merkreda kunveno!

## Strasbourg

- Kursoj por komencantoj okazis lunde en nia luita klasĉambro; 5 komencantoj ĉeestis ĝis junio 2020. Bedaŭrinde pro la pandemio la klasĉambro estis fermita, tamen tiam kursoj okazis preskaŭ ĉiusemajne marde kaj ĵaŭde vespere per Jitsi (Interrete). Ni uzas la libretojn de Esperanto-France *Metodo11* kaj *Metodo12*.
- La kulturaj vesperoj okazis nur per interreto. Ili okazis ĉiumonate ĝis majo 2021. Ni ludis kaj babilis pri diversaj temoj. Partoprenis ĉiufoje ĉirkaŭ dek-du klubanoj.
- Ni piknikis du fojojn en la parko Jardin des deux Rives (Ĝardeno de ambaŭ riverbordoj), sur la franca flanko vespere, sabaton la 26an de junio, kaj sur la germana flanko tagmeze, sabaton la 28an de aŭgusto. Ni estis la du fojojn preskaŭ 20 partoprenantoj francaj, germanaj, usona, kaj eĉ rusa. Tre agrabla etoso, ni kune trinkis, manĝis, babilis, ludis. Por kelkaj Duolingo-esperantistoj estis bona okazo renkonti esperantistajn vivantojn.



- La klubo havis budon en la strasburga foiro de asocioj Village des Associations en la parko Parc de la Citadelle sabaton kaj dimanĉon 18-19-ajn de septembro. Sep klubanoj deĵoris kaj renkontis komencantojn, komencintojn (per Duolingo) kaj disdonis esperantajn kalendarojn. Kelkaj libroj estis venditaj. Tio estis bona okazo diskonigi Esperanton kaj la klubon.
- La ĝenerala kunsido okazis en Social Bar en Strasburgo, la 23-an de septembro. Tiam ni akceptis la organizon de ĝenerala membrokunveno de Esperanto-France kaj Germana Esperanto-Kongreso en 2024 en Strasburgo. Ni ankaŭ planis organizi tagon por informi pri esperanto en la Maison des Associations, la 21a de majo 2022. Ni ankaŭ decidis retranskribi kun anoj de la nova esperanta klubo de Tübingen.
- Post prezentado en Village des Associations en Strasburgo kaj informado pri Esperanto la 20an de septembro en Illkirch, venis 5 novaj komencantoj al la kursoj, kiuj okazas denove ĉiun lundon en nia klasĉambro en Illkirch.
- Ni denove ĉiumonate organizis ekde oktobro 2021 interretajn monatajn kulturajn vesperojn.

## T.A.K.E.

La cirkonstancoj de la ĵus pasinta jaro 2021 klare malebligis multajn niajn kutimajn agadojn. La devigo restadi hejme trafis multajn asociojn en siaj aktivecoj. Tial nia last-jara membro-kunveno okazis la 22an de novembro 2020 nur per skajpo (interrete).

- En decembro 2020 ni povis dissendi la decembran cirkuleron al niaj membroj.
- En marto 2021 dank'al pluraj kontribuoj ni povis eldoni nian eldonaĵon: Konstruado-kajero 2021 kun 88 paĝoj, plej multaj koloraj. Ĝi estis sendita al ĉiuj niaj membroj kaj al diversaj instancoj, aŭtoroj.
- Finfine en oktobro 2021 ni povis informi niajn membrojn per la oktobra cirkulero pri nia ĝenerala membrokunveno.

### Renkontoj kaj kontaktoj

Pro manko de Universala Kongreso en Norda Irlando kaj de aliaj eventoj, ni havis malpli da eblecoj proponi nian eldonaĵon al partoprenantoj de tiaj eventoj. UK disvolviĝis sur la reto dank' al la klopodoj de a@i. (<https://vk.esperanto.net/>). Bone organizita, kiel pasint-jare, dum kio okazis ankaŭ la scienca kaj teknika renkonto KAEST. Gratulojn al la gejunuloj, kiuj montris egan efikecon!

### KONSTRUADO-kajero 2021

- La revuo *KONSTRUADO-kajero 2021*: en 2021, ni sukcesis havigi al la revuo novajn kunlaborantojn el R.D. Kongo kaj el Brazilo. Tio estas rimarkinda rezulto (espereble daŭra!), ĉar ni ĉiam frontas la malfacilaĵojn por allogi novajn kunlaborantojn. Notu la 80-paĝan enhavon!
- La ĉefa temo en 2021 estis AKVO. Jes, en la vivo kaj ankaŭ en la fakoj konstruado kaj arkitekturo la provizado je akvo estas nepre atentinda objekto. Tial, dank' al Allan Argolo, inĝeniero pri mediprotektado en Brazilo, aperis longa artikolo pri havigo de trinkebla akvo kaj pri teknikaj salubrigorimedoj. Ni povis ankaŭ respreguligi la laboron de Asocio PIEADC en Konga urbo Kalima. De 2013 ĝis nun, iom post iome estis kreita tuta reto da akvo-tuboj por disdoni trinkeblan akvon al la tiea loĝantaro.
- La rezulton oni atingis dank' al longa kaj serioza kunlaborado de afrikanoj de Goma kaj Kalima (ne ĉiuj esperantistoj) kaj de la asocio AVE (Asocio de verdulaj esperantistoj), precipe el Germanio, kiuj serĉis financajn apogojn. Tiu agado, prizorgata de Manfred Westermayer estas plu apoginda:
- Noto al niaj legantoj: se vi montras nian revuon en ekspozicio, publika renkontejo, ktp, nepre substreku la efikan kunlaboradon – dank'al Esperanto! – de personoj, kiuj tute ne povis rilati inter si per siaj denaskaj lingvoj.
- Nia lingvo estas rimedo ne nur de parolemuloj! <http://www.verduloj.org/afriko.htm> ; rete: [AVE@verduloj.org](mailto:AVE@verduloj.org)
- Alia aspekto de tiuj pri-akvaj temoj: serĉante informojn pri la riparado de kloaka galerio, la aŭtoro ĝuis per-retan rendevuon kun la loka teknika direktoro kaj lia kunlaborantino (dankon al ili!). Poste, ili ricevis

ekzemplerojn de la revuo. Eĉ se profesiuloj ne parolas Esperanton, ne lernas ĝin, indas, ke ili sciu, ke Esperanto ekzistas kaj havas praktikajn aplikojn!

### Arkitekturo

- Ne surprizas onin, ke la temo "arkitekturo" multe ĉeestas en nia revuo, flanke de teknikaj temoj. Fakte, konstruado sen arkitektoj ne eblas! Ambaŭ fakoj estas streĉe ligataj!
- Tial, ni devas ankaŭ substreki la gravan laboron de nia kunlaboranto Claude Bensimon, eks-arkitekto, kiu provizis nian revuon per serio da artikoloj (2018, 2020, 2021) vere konservindaj! En tiu lasta eldono (2021) li provizis la legantojn inter aliaj temoj per tabelo dupaĝa kun arkitektaj terminoj (en la franca kaj en Esperanto). Estus bone, se esperantistoj volus kompletigi tian laboron per vortoj el siaj propraj lingvoj. Bedaŭrinde ni ne plu povas kalkuli je la helpo en terminologio de Jan Werner, ĉeĥa inĝeniero, kiu forpasis antaŭ nelonge.

Ni dankas vin pro via atento! Pierre Grollemund, sekretario de TAKE

## Thionville

### **Agadraporto de septembro 2020 ĝis aŭgusto 2021**

#### Monataj kunvenoj ĉe la domo de la asocioj Raymond Queneau en Thionville

- Ok sabataj renkontiĝoj inter la 14:00 kaj 15:30 okazis videotelefone pro la pandemio kaj du pliaj okazis fizike en novembro 2020 kaj januaro 2021 kun Bruno Henry, kiu revenis de Ĉinio en la pasinta vintro. Kiam Bruno estas en Ĉinio, li parolas al ni pri la ĉiutaga vivo kaj liaj esperantistaj agadoj en ĉi tiu lando.
- Dum la kunvenoj estis donitaj informoj pri la venontaj internaciaj kaj regionaj aranĝoj: la Universala Esperanto-Kongreso en Belfasto Norda Irlando, la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT en Bjalistoko en Pollando, kaj diversaj Esperanto-renkontiĝoj.
- Ni praktikas Esperanton en niaj konversacioj parolante pri diversaj temoj. Ni memorigis pri Eŭgeno de Zilah, kiu malaperis la 02/10/2020. Li estis la kreinto de la Esperanto-klubo de Metz kaj verkis plurajn interesajn librojn *Vivi en Barko*, *Kaj kiu pravas* kaj *La princo ĉe la Hunoj*. Ankaŭ Eŭgeno de Zilah eldonis proprakoste dum 20 jaroj la revuon *La Gazeto*. Bernard rakontas al ni pri geneologio kaj la esploroj, kiujn li faras pri la historio de sia familio. Catherine rakontas, ke ŝi helpas la Kulturdomon de Esperanto Grésillon Baugé-en-Anjou por allogi novajn turistajn grupojn, familiajn kunvenojn kaj seminariojn.

Esperanto-kursoj: Komencantoj kaj praktikantoj en Thionville. Pro la pandemio bedaŭrinde la kursoj ne okazis.

Prelegoj: Pro la pandemio ni ne povis organizi prelegojn de eksterlandaj Esperanto-parolantoj.

Zamenhofa Festo: Ni planis organizi ĝin kune kun niaj amikoj de la Luksemburga Esperanto-Asocio, sed la restoracioj estis fermitaj pro la pandemio.

Nia partopreno en diversaj kongresoj kaj vojaĝoj. La sezono 2020/2021 estis profunde markita pro la sanaj problemoj kaŭzitaj de la KOVIM-19-pandemio kaj pro tio la esperantistaj organizaĵoj nuligis multajn fizikajn eventojn kaj anstataŭigis ilin per virtualaj kongresoj kun riĉaj programoj de prelegoj, debatoj kaj spektakloj. Tiuj kulturaj eventoj kunvenigis centojn da Esperanto-parolantoj el la tuta mondo. Kelkaj el ni partoprenis en la virtuala kongreso de Universala Esperanto-Asocio UEA, la kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio IFEF kaj la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT, la kongreso de SAT-Amikaro kaj la ĝenerala kunveno de la Kulturdomo de Esperanto Grésillon en Baugé-en-Anjou.

Bernard kontribuis al la disvolviĝo de la programo Duolingo por lerni Esperanton per saĝaj poŝtelefonoj laborante en teamo pri la franca versio al la celloĝo Esperanto, <https://www.duolingo.com/learn>

## **Projektoj 2021/2022 prezentitaj en Esperanto de Bruno Henry**

Monataj kunvenoj: Ili okazos unufoje monate ĉiu-sabate de la 14a ĝis la 16a ekde 09/10/2021 per videokonferenco aŭ ĉe la Maison Queneau en Thionville. La celo estas praktiki Esperanton, lerni pli kaj prepari sin por novaj agadoj.

Zamenhof-Festo Decembro 2021: Kontakto estos farita kun la Luksemburga Esperanto-Asocio por organizi ĝin kune en Luksemburgio.

Kulturaj kaj muzikaj vesperoj: Ni vidos laŭ la proponoj, kio okazos pri la prelegturneoj organizotaj de Esperanto-France.

Esperanto-budo: Sugestoj laŭ la ebloj.

Ekskurso por praktiki Esperanton: Bruno elvokas la eblajn elirojn. Ankaŭ vidu por estontaj kunvenoj. Rimarku, ke nia asocio ankaŭ povas finance partopreni ĉi tiujn ekskursojn. Bruno kontaktos Catherine, ĉu ŝi povus proponi al ni gvidatan viziton de turisma loko.

Staĝoj kaj seminarioj en Francio kaj eksterlando.

*Raportas Jean-Luc Thibias*

# 5.11. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)

## 1. Administrado

### 1.1. Membraro

en 2021 : 85 (en 2020 : 94 – en 2019 : 156 – en 2018 : 161 – en 2017 : 120)

### 1.2. Jarkunveno

La jarkunveno okazis sabaton la 20an de marto 2021 rete per Zoom. La agadan kaj finanĉan raporton aprobis la membroj per reta kaj poŝta voĉdonadoj.

Jen la nova komitato: Michèle Abada-Simon, Pierre Gauthier, Marc Giraud, Didier Janot, Aurélien Lestage, Didier Loison, François Lo Jacomo, Marielle Martin, Laure Patas d'Illiers, Guillaume Vera-Navas, Frantz Vichot.

Tuj post la jarkunsido, la komitato elektis novan estraron: Marc Giraud (prezidanto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-Francio), Laure Patas d'Illiers (sekretario), Didier Loison (kasisto), Pierre Gauthier (vic-kasisto).

Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2022.

### 1.3. Komitataj kunvenoj

Inter la lasta jarkunsido kaj la venonta, la komitato kunsidis 5foje : 20/03, 04/06, 18/09, 03/12, 28/01.

### 1.4. Rilatoj kun Esperanto-France

Marc Giraud estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-Francio. Diversaj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe la ĉerizejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-Francio kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio.

## Komunikado

La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo [esperanto.paris](http://esperanto.paris). Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj: [esperanto.paris](http://esperanto.paris) (D. Janot, A. Lesage), Esperanto Aktiv (L. Patas d'Illiers, M. Giraud), Facebook (M. Giraud, D. Loison), [dissendo-listoj](http://dissendo-listoj.org) (L. Patas d'Illiers, M. Giraud), Duolingo (L. Patas d'Illiers), Amikumu (P. Gauthier), Twitter (P. Gauthier), Telegramo (A. Lestage).

## 2. Agadoj

### 2.1. Eventoj

En 2021, la iom pliboniĝanta sanitara situacio ebligis al ni denove organizi kelkajn ĉeestajn eventojn.

**Kulturaj vesperoj:** (LPI) Kulturaj vesperoj okazas ĉiumonate, la 1-an merkredon, eble ankaŭ la 3an merkredon. En novembro, ni lanĉis novan projekton: mem krei filmeton. La filmeto estos humura. Ĝi uzeblas kiel parto de spektaklo dum festoj. Ĝi ankaŭ estos enretigebla. Kiel elirpunkton ni uzis malnovan skeĉon, verkitan de François Lo Jacomo por la teatra asocio TESPAs kaj jam plurfoje surscenigitan. La skeĉo estis verkita por viva ludo sur sceno; necesis adapti ĝin por filmado. Dum la unua trimestro, per komuna laboro dum la kulturaj vesperoj, ni adaptis la tekston kaj kunkreis la scenaron de la filmeto. Dum la dua trimestro, ni provos dediĉi ĉiumonate la 3an merkredojn al la filmado, por ke la 1-a merkredo estu libera por aliaj kulturaj agadoj. Ni komencis filmi la scenojn, kiuj okazas en la sidejo. Dum la printempo, ni intencas filmi la scenojn, kiuj okazas ekstere. Ĉiuj estas bonvenaj por partopreni la filmadon, kiel rolanto, helpanto, konsilanto, ktp.

**Eo-kafejoj:** La Esperanto-kafejo okazas ĉiumonate la duan sabaton. Estas okazo por Esperantistoj por renkonti kaj babili pri io ajn dum manĝante kaj trinkumante en bonetosaj lokoj. Komencantoj estas bonvenaj. En 2021, ĝi ne okazis de januaro ĝis junio pro sana krizo.

**Foiro pri matematikaj ludoj:** Kiel pasintjare, Animath organizis virtuale sian foiron pri matematikaj ludoj, de la 27a ĝis la 30a de majo, kaj denove nia francilia federacio partoprenis. Novan filmeton *ElémentERe, l'espéranto!* kreis tiucele François, Laure kaj Régis aldone al la pasintjara (*L'espéranto, une langue presque mathématique*), al tiu de Elisabeth (*L'espéranto, un jeu d'enfant*) kaj al pli longa esperantlingva (kun francaj subtekstoj) pri orientita geometrio, de François. Ĉiuj kvar daŭre videblas per Jutubo (spektitaj entute pli ol 400-foje). Ĉiutage de la 15-a ĝis la 17-a ni ĉeestis virtuale kun kvar malsamaj temoj: *L'espéranto, porte de l'interculturalité*; *L'espéranto, un exercice de logique*; *L'espéranto et sa culture*; *L'espéranto, aide à l'apprentissage*; sed kun nesufiĉa ekstera publiko. La anonco pri nia budo estis ne facile trovebla: ni esperu, ke venontjare la foiro okazos ĉeeste.

**Homara festo:** per homaj laborfortoj ni kontribuis al la partoprenado de Esperanto-Francio en septembro 2021. Dum tri tagoj, 10-11-12a de septembro 2021, pluraj membroj de nia asocio venis al la Homara festo por deĵori ĉe la budo de EsperantoFrance ene de la "Libra Vilaĝo". Aldone al la disdonado de kalendaretoj kaj paĝmarkiloj, pluraj libroj estis venditaj tiuokaze. Tiu sperto naskis plurajn ideojn por plibonigi la venontajn ĉeestajn eventojn.

**Debato pri la futuro de UEA:** sabaton la 22-an de Januaro kun Francesco Maurelli (hibrida evento). Kun pli ol 20 partoprenantoj, ĉeeste kaj virtuale, Francesco Maurelli, el la financa komisiono de UEA, dum kelkhora restado en Parizo (inter du aviadiloj) debatis pri la estonteco de UEA. Venis demandoj pri la eventuala vendo de la Centra Oficejo, la biblioteko Hector Hodler, la financa situacio, la komitato, la delegita reto... La debaton gvidis Marc.

### 2.2. Instruado

De septembro 2021 nia federacio ofertas 5 kursojn.

- ĉeesta por komencantoj de MAS (2 lernantoj)
- ĉeesta por altniveluloj de FLJ (6 lernantoj)

- ĉeesta kurso “Café croissants Espéranto” de GVN (varia nombro de lernantoj)
- reta kurso por komencintoj de MG (5 lernantoj)
- reta kurso por mezniveluloj de MG (4 lernantoj)

*Raportas Laure Patas d’Illiers*

## 5.12. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

### 1. Membraro

Je la 31a de decembro 2021, Espéranto-Provence havis 97 membrojn (+15).

### 2. Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

#### 2.1 Deklaritaj asocioj

• **Kiuj plu ekzistas kaj pli malpli aktivas**

13 - Marseille: 13 federaciaj membroj (ttt-ejo: <http://esperanto.marseille.over-blog.com>)

83 - Saint-Raphaël: Espéranto-Club Saint-Raphaël (10 federaciaj membroj)

83 - Le Beausset: Espéranto-Le Beausset (8 federaciaj membroj)

84 - Avignon: K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono) – 3 federaciaj membroj

• **Kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas**

04 - Manosque: E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque) – 3 federaciaj membroj

05 - Gap: Espéranto-Gap – 2 federaciaj membroj

13 - La Roque-d'Anthéron : Espéranto-La Roque

13 - Miramas: G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

#### 2.2 Antenaj grupoj de Espéranto-Provenco

13 - La Ciotat (2 federaciaj membroj)

83 - Hyères (5 federaciaj membroj)

### 3. Administro

Estraranoj (3): prezidanto (Pierre Oliva), sekretario (Pascal Vilain), kasisto (Nicole Lafitte)

Aliaj komitatanoj (6): Monique Arnaud, Marc Gallardo, Josiane Moirand, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

Gazet-respondeculo: Pascal Vilain

Retej-respondeculoj: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

Reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: Pascal Vilain (ĝis la membro-kunveno de Espéranto-France) kaj Thierry Spanjaard (ekde ĝi)

#### Membrokunveno

Ĝi ne okazis pro la sankrizo.

#### Komitatkunsidoj

- junio 21 – La Ciotat (ĉe Renée Triolle)
- aliaj prokrastitaj pro la sankrizo

## 4. Instruado

**Kursoj:** En la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon

**Staĝoj:** MES kaj Le Beausset nuligitaj

**Ekzamenoj:** nuligitaj

## 5. Informado – komunikado

- Kiam eblis ĉijare, disdonado de Le Monde de l'espéranto (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Hyères)
- Kiam eblis ĉijare, en Marseille (Brasserie les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille), la 1-an ĵaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo
- Kiam eblis ĉijare, en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato : Lingva kafejo
- Septembro – Avignon, La Ciotat, Marseille, Le Beausset, Saint-Raphaël: "Forumo de la asocioj"

## 6. Klubaj eventoj

- kiam ne eblis fizike kuniĝi ,Espéranto-Marseille proponis dufoje monate retajn kunvenojn
- januaro – en La Ciotat kaj Marseille : hejmaj konversacioj + reĝkukaj festetoj
- januaro 27 - Saint-Raphaël : reĝkuka festo + membro-kunveno
- julio 4 - Les Arcs-sur-Argens : pikikno de la klubo Fréjus-Saint-Raphaël

## 7. Movadaj eventoj

- Majo 15 – rete: komitatkunsido kaj Ĝenerala membro-kunveno de Espéranto-France ; partoprenis parte P. Vilain (1a kunsido kaj membrokunsido) kaj parte T. Spanjaard (2a kunsido kaj membrokunsido)
- Julio 3 – Sainte-Énimie (48): N. Lafitte kaj P. Oliva partoprenis en la ĝenerala membro-kunveno de la asocio «Espéranto-Info».
- Julio 3-9 – Kastelo Greziljono: 1-a *Festivalo Naturist' por nova mondo* kaj 2a *Verda Naturisma Semajno*, organizita de La Kulturdomo kaj INOE - partoprenis pluraj membroj de Espéranto-Provence - gvidis kursojn por komencantoj T. Spanjaard.
- Julio 23 / aŭgusto 2 – Kastelo Greziljono: 5a *Maratona Esperanto-kurso* – gvidis kurson R. Triolle
- Julio 17-24: 2a Virtuala UEA-Kongreso de Esperanto – partoprenis pluraj Provencanoj
- Oktobro 15-21 – Métabief (25): staĝo organizita de Espéranto chalonnois – partoprenis Josiane Moirand
- Oktobro 9 – rete: Aŭtuna Reta Festo de Espéranto-France – kontribuis T. Spanjaard per prezento de la Jutuba EsKu-kanalo
- Oktobro 10 – Parizo: komitatkunsido de Espéranto-France – partoprenis T. Spanjaard

- Oktobro 10 – Parizo: kunveno de FEI – partoprenis R. Triolle kaj P. Vilain
- Oktobro 19-24 – Kastelo Greziljono: kantstaĝo «Interkant» - Partoprenis N. Lafitte, P. Oliva kaj B. Bigonnet
- Oktobro 25 / novembro 3 – Kastelo Greziljono: staĝo *Aŭtune* - partoprenis B. Bigonnet; vizitis tiam la kastelon M.R kaj P. Vilain
- Dum la tuta jaro, artikoloj de provencanoj (R. Triolle, M. Gallardo, J. Grammatico, J.F. Cousineau, C. Carrey, P. Vilain) en la revuoj *Monato*, *Le Monde de l'espéranto*, *Espéranto-info*, *La KancerKliniko*, *Literatura Foiro...*
- Dum la tuta jaro: N. Lafitte kaj P. Vilain partoprenis en verkateliero iniciatita de A. Löwenstein
- Dum la tuta jaro: J. Cousineau korektis la revuon *Espéranto-Info*; P. Vilain korektis *Le Monde de l'espéranto*.
- Kontribuo de P. Vilain en la redaktado de *Oklingva Proverbaro*, verko iniciatita de P. Desmet (eld. FEL)

## 8. Kulturaj kaj alispecaj eventoj

- Julio 21-25 – Berlino (Germanio) : *Fieru! 2021* – GLAT-a Esperanto-renkontiĝo – partoprenis T. Spanjaard
- Oktobro – lanĉo de la nova Jutuba kanalo *EsKu*, iniciatita de T. Spanjaard kaj P. Vilain – jam aperis 6 filmetoj
- Novembro 9-24 – Parizo: Ĝenerala Konferenco de UNESKO – nome de UEA partoprenis R. Triolle

## 9. Diversaĵoj

- Junio/oktobro: A. Rémy bicikle vojaĝis tra Eŭropo.

## 10. Venontaj okazaĵoj

- Februaro 26-marto 5 – Les Issambres: *Mediterranea Esperanto-Semajno 2022*
- Novembro 2022 – *Kultura Semajnfino* en Le Beausset

*Raportas Pascal Vilain*

# 5.13. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes (Puatuo-Ĉarentoj)

La federacio estas dormanta. Tamen gravajn eventojn okazigas en Puatuo-Ĉarentoj la kulturcentro pri esperanto Kvinpetalo en Bouresse (86) (vd. ĉisupre la paragrafon 2.1.2 Kvinpetalo).

## 5.14. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

# 6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

## 6.1. Espéranto-Jeunes (JEF0)

Ni ankoraŭ ne ricevis raporton.

## 6.2. ILEI-Francio

ILEI-Francio esta kaj faka asocio de Espéranto-France, kaj landa sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Ĝi grupigas:

- instruistojn en bazlernejoj, mezlernejoj kaj universitatoj,
- kursgvidantojn kaj instruantojn,
- ĉiujn homojn kiuj interesiĝas pri instruado.

Ĝia ĉefa celo estas disvastigi instruadon de Esperanto, interalie ĉe baz/mezlernejoj kaj universitatoj.

*Raportas Didier Janot*

## 6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

## 6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.